


La internacia lingvo Esperanto kaj la gepatra lingvo.



Okaze de la tago de la gepatra lingvo, 21-a de februaro kaj la centjara datreveno de la forpaso de Ludoviko L. Zamenhof, la 14-a de aprilon 2017, esperanto-parolantoj el pli ol cent landoj montros sian memoron kaj dankon, ke li kreis tiun relative rapide lerneblan lingvon.

Ankora? nur malmulte estas konate, ke intertempe vivas jam proksimume mil Esperanto-denaskuloj, kiuj lernas la lingvon hejme a? lernis dum sia

infaneco. Ekzistas anka? specialaj familiaj renkonti?oj, kie kunvenas

Esperanto-denaskuloj el multaj landoj. Ulrich Brandenburg, anta?a germana

ambasadoro en Moskvo, lernis Esperanton dum sia infaneco en la kvindekaj

jaroj.

En Kubo, la tre konata kaj elstara intelektulo Don Fernando Ortiz, anka? okupi?is pri ?i kaj asertisla

jenon:n «Sen troigoj, eblas aserti ke Esperanto estas vera filologia filozofio a? filozofia filologio »

Fakte, Zamenhof estis jam frue konscia pri la aparta signifo de denaskula komunumo por la estonteco kaj stabileco de lingvo. En 1901 li skribis en letero, kiom grava estas grupo de homoj, kiuj akceptus Esperanton kiel sian familian lingvon. La vivo de la lingvo per tio estus multe pli bone garantiita.

Denaskuloj en la lingvo-komunumo de Esperanto estas ja percepteblaj

malgra? ilia relative malgranda nombro - ekzemple ?e la prilaboro de la Esperanto-vikipedio, kiu enhavas nun pli ol 230.000 artikolojn.

La evoluo de la komunumo de la Esperanto-denaskuloj montras, ke Esperanto jam delonge sukcesis atingi la statuson de vivanta lingvo kaj ke la lingvo nun plu disvasti?as.

Esperanto-lingvokurso ?e Duolingo.com nuntempe havas ?irka? 700 000 Esperanto-lernantoj, anka? hispanlingvanoj havas la eblecon tion fari.

La nombro de tiuj, kiuj lernis Esperanton kiel duan lingvon kaj regule parolas la lingvon, estas taksata je pluraj cent mil homoj - pli ol la centoblo de la nombro de denaskuloj. Entute la? diversaj taksoj pluraj milionoj da homoj lernis Esperanton.

<https://www.duolingo.com/courses/>

?e youtube oni povas vidi intervjuon kun kelkaj Esperanto-denaskuloj, kun subteksto en pluraj lingvoj.

<https://www.youtube.com/watch?v=UzDS2WyemBI>

<https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/122073-la-internacia-lingvo-esperanto-kaj-la-gepatra-lingvo>



Radio Habana Cuba